

Simpozio pri interkultura
komunikado

Symposium on Communication
Across Cultural Boundaries

2003-08-02—03

Simpozio pri interkultura komunikado

Apogata de la Sveda Akademio

SIK 2003

Symposium on Communication

Across Cultural Boundaries

Supported by the Swedish Academy

La Akademio de Esperanto, kunlabore kun profesoroj Sture Allén kaj Sven-Göran Malmgren de la Gotenburga Universitato, aranĝis simpozion pri interkultura komunikado en Gotenburgo, Svedio, 2003-08-02—03. La simpozion apogis finance la Sveda Akademio, fondita en 1768 de la reĝo Gustavo III, kaj la Instituto pri la sveda lingvo de la Gotenburga Universitato.

Lingvoj: Esperanto kaj la angla.

Tempo: 2003-08-02 14:00 ĝis 2003-08-03 17:25.

Loko: Gotenburga Universitato, Instituto pri la sveda lingvo, Renströmsgatan 6, Gotenburgo, Svedio. La lekcioj okazis en la salono “Lilla hörsalen” en la domo “Humanisten”.

The Academy of Esperanto, in collaboration with Professors Sture Allén and Sven-Göran Malmgren of Göteborg University, organized a symposium on cross-cultural communication in Göteborg, Sweden, on August 2–3, 2003. The Swedish Academy, founded in 1768 by the king Gustavus III, and the Department of Swedish of Göteborg University supported the symposium financially.

Languages: Esperanto and English.

Time: 2003-08-02 14:00 through 2003-08-03 17:25.

Venue: Göteborg University, Department of Swedish, Renströmsgatan 6, Göteborg, Sweden. The lectures took place in the lecture room “Lilla hörsalen” in the building “Humanisten.”

Programkomitato / Program Committee

Honora prezidanto / Honorary Chair: Sture Allén

Prezidanto / Chair: Christer Kiselman

Renato Corsetti

Probal Dasgupta

Sven-Göran Malmgren

Geraldo Mattos

Programo Program

2003-08-02

14:00–14:40	Sture Allén: <i>In the spirit of cultural communication (Spirite de kultura komunikado).</i> Chair: Christer Kiselman.
14:40–15:00	Diskuto / Discussion.
15:10–15:50	Jouko Lindstedt: <i>Interlingva komunikado sen interlingvo: la balkania modelo (Cross-language communication without a lingua franca: the Balkan model).</i> Prezidas: Renato Corsetti.
15:50–16:05	Diskuto / Discussion.
16:05–16:35	Refreŝigoj / Refreshments.
16:35–17:15	Renato Corsetti: <i>La arbo daŭrigas verda sian verdecon: lingvaj kaj kulturaj aspektoj de la lernanto-lingvo ĉe lernantoj de Esperanto (The tree still greens its greenness: linguistic and cultural aspects of the interlanguage of people learning Esperanto).</i> Prezidas: Humphrey Tonkin.
17:15–17:30	Diskuto / Discussion.
17:30–18:10	Sven-Göran Malmgren: <i>From biskop to daytrader. Foreign influence on Swedish vocabulary as a result of cross-cultural communication (De biskop al daytrader. Fremda influo en la sveda vortprovizo rezulte de interkultura komunikado).</i> Chair: Renato Corsetti.
18:10–18:25	Diskuto / Discussion.
18:30—	Bufeda vespermanĝo / Buffet Dinner.

Poster session

Fu Kin-hung: *A Cross-Cultural Comparison Between First Naming in Cantonese and English (Interkultura komparo inter la uzado de la persona nomo en la kantona kaj la angla lingvoj).*

2003-08-03

09:15–09:55	Lars-Gunnar Andersson: <i>What makes a language hard? (Kio faras lingvon malfacila?)</i> Chair: Sture Allén.
09:55–10:10	Diskuto / Discussion.
10:10–10:40	Refreŝigoj / Refreshments.
10:40–11:20	Detlev Blanke: <i>Tradukado kaj Esperanto: traduksciencaj aspektoj (Translation and Esperanto: on some problems of translation theory).</i> Prezidas: Probal Dasgupto.
11:20–11:35	Diskuto / Discussion.
11:35–12:15	Probal Dasgupta: <i>Kulturaj limoj kaj la civila socio en multlingva socio: aliro substancisma (Cultural boundaries and civil society in a multilingual society: a substantivist approach).</i> Prezidas: Christer Kiselman.
12:15–12:30	Diskuto / Discussion.
12:30–13:45	Bufeda tagmanĝo / Buffet Lunch.
13:45–14:25	Koutny Ilona: <i>Esperanto kaj la angla kiel interkulturaj komunikiloj (Esperanto and English as intercultural communication tools).</i> Prezidas: Probal Dasgupta.
14:25–14:40	Diskuto / Discussion.
14:40–15:20	Humphrey Tonkin: <i>Esperanto: La kultura dimensio (Esperanto: The cultural dimension).</i> Prezidas: Sture Allén.
15:20–15:35	Diskuto / Discussion.
15:35–16:05	Refreŝigoj / Refreshments.
16:05–16:35	Franz-Georg Rössler: <i>La muziko – ĉu vere internacia lingvo? (Music—is it really an international language?)</i> Prezidas: Ilona Koutny.
16:35–16:45	Diskuto / Discussion.
16:45–17:15	Zlatko Tišljär: <i>Ĉu interkulturaj diferencoj helpas aŭ malhelpas la interkulturan dialogon? (Are intercultural differences helpful for the process of intercultural dialogue?)</i> Prezidas: Christer Kiselman.
17:15–17:25	Diskuto / Discussion.

La vespermanĝo sabate, la tagmanĝo dimanĉe kaj la refreŝigoj estis senpagaj por ĉiuj partoprenantoj dank'al la malavara subteno de la Sveda Akademio kaj la Instituto pri la sveda lingvo.

The dinner on Saturday, the lunch on Sunday, and the refreshments were served free of charge for all participants, thanks to the generous support of the Swedish Academy and the Department of Swedish.

Resumoj Abstracts

Sture Allén: *In the spirit of cultural communication (Spirite de kultura komunikado).*

Abstract: I intend to enter upon some aspects of cultural communication and illustrate them by examples, among them the Nobel Prize for Literature and the language situation of the European Union. My main thesis is that fully adequate communication between different cultural spheres is unfeasible, whereas serious cultural communication is absolutely necessary. An opportunity to discuss these fundamental things is of great value, and in this spirit I invite everybody to contribute to the cultural communication of the symposium.

Resumo: Mi intencas trakti kelkajn aspektojn de kultura komunikado kaj ilustri ilin per ekzemploj, inter kiuj la Nobel-premio pri literaturo kaj la lingva situacio en la Eŭropa unio. Mia ĉefa tezo estas ke plene adekvata komunikado inter malsamaj kulturaj sferoj estas nebla, dum serioza kultura komunikado estas absolute necesa. Ebleco diskuti tiujn ĉi fundamentajn temojn estas ege valora, kaj en tiu etoso mi invitas ĉiujn kontribui al la kultura komunikado de tiu ĉi simpozio.

Lars-Gunnar Andersson: *What makes a language hard? (Kio faras lingvon malfacila?)*

Abstract: People in general often talk about some languages being harder than others. Most people would, for example, say that French is harder (to learn) than English. The point of this lecture is to discuss issues of hard and simple in connection with languages from a linguistic point of view. Can we really say that one language is simpler than another and what do we mean when we say that?

Resumo: Homoj ofte opinias ke kelkaj lingvoj estas pli malfacilaj ol aliaj. Multaj diras, ekzemple, ke la franca estas pli malfacila (por lerni) ol la angla. Mi diskutos la nociojn de lingva malfacileco kaj facileco el lingvistika vidpunkto. Ĉu ni vere povas diri ke unu lingvo estas pli facila ol alia, kaj kion ni komprenas kiam ni diras tion?

Detlev Blanke: *Tradukado kaj Esperanto: traduksciencaj aspektoj (Translation and Esperanto: on some problems of translation theory).*

Resumo: Tradukado en Esperanto estas unu el la ĉefaj lingvoevoluiĝaj faktoroj por la planlingvo kaj ĉiam restos fundamente grava por ĝi pro ĝia ĉefa funkcio de 'lingua franca'. Samtempe lingva evoluinteco baze influas la kvaliton de tradukaĵo. Malgraŭ amaso da tradukaĵoj faritaj kaj kaj daŭre farataj la traduksciencaj rezonadoj en Esperanto maloftas. La prelego diskutos i.a. la objekton de tradukscienco, la problemon de eblo kaj neblo de tradukado kaj kelkajn teoriojn kaj modelojn de la tradukado, orientitajn a) laŭ tekstoj, b) laŭ procezoj, c) laŭ tradukistoj.

Abstract: Translation is a major factor in the development of Esperanto and it will always be of fundamental importance for the planned language due to its

function as a ‘lingua franca.’ At the same time the state of language development basically influences the quality of translations. Despite the large amount of texts that are constantly translated into Esperanto, aspects of translation theory are hardly discussed. The paper deals with, among other things, the object of translation science, the limits of translatability as well as with a number of translation theories and models orientated towards (a) texts, (b) processes, (c) translators.

Renato Corsetti: *La arbo daŭrigas verda sian verdecon: lingvaj kaj kulturaj aspektoj de la lernanto-lingvo ĉe lernantoj de Esperanto (The tree still greens its greenness: linguistic and cultural aspects of the interlanguage of people learning Esperanto).*

Resumo: La prelego montros la influojn de la gepatra lingvo je la lernado de Esperanto. Estis testitaj 111 parolantoj el la lingvo-grupoj angla, persa, hungara kaj rusa. En ĉiu lingvo la testatoj apartenis al tri malsamaj grupoj: komencantoj, progresantoj kaj spertuloj. Ĉiuj testatoj devis doni juĝojn pri la gramatikeco de difinitaj frazoj (rilatantaj al libereco de la ordo de sintagmoj, al dividebleco de sintagmoj kaj al frazoj kun kaj sen kromvorto antaŭ relativa subfrazo) kaj devis libere priskribi bildon. La rezultoj indikas influon de la gepatra lingvo en la komencaj fazoj de la lernanto-lingvo kaj restanta influo ankaŭ en la lingvo uzata de spertaj parolantoj de Esperanto.

Abstract: This lecture will show the influence of the mother tongue on people learning Esperanto. One hundred eleven persons were tested. Their mother tongues were English, Hungarian, Persian and Russian. Within each of these four groups they were divided into three categories according to their knowledge of Esperanto: beginners, intermediate and advanced. They were asked to describe a picture in their own words, and to judge the grammatical correctness of sentences given in Esperanto which were designed to test the free syntagm order, the divisibility of syntagm components and the use of expletives. The results show mother tongue influence in the early phases of the interlanguage and a remaining influence even in the language used by fluent Esperanto speakers.

Probal Dasgupta: *Kulturaj limoj kaj la civila socio en multlingva socio: aliro substancisma (Cultural boundaries and civil society in a multilingual society: a substantivist approach).*

Resumo: La ŝlosilaj vortoj *kulturo* kaj *civila* kaj *multlingva* kaj *substancisma* ĉiuj taŭgas al la seruro de tiu ĉi teksto, la civilizo. Kontraste al la postmodernismo prikultura, la ĉi tie ekzemplata transmoderna aliro al la civilizo emfazas la eblecon de la reciproka lernado inter paralelaj sciovojoj. La transmoderno agordas la sciadon al spertoj sur spertojn, diference de la postmoderna agordo de la potenco al agoj sur agojn (kio subkomprenigis, ke la sciado ĉiam tuj centriĝas kaj rolas potencile). Per tiu agorda laboro la transmoderno komencas malmunti la formalisman malvastigon de la Klerismo. Analiza aparato tiucela, nomata la substancisma aliro, teorias pri la homa elektado enfokusigante la kulturajn koeficientojn, kiujn laŭ tiu perspektivo ĉiu elektanto flegas per ĉiu elekta ago, kaj

la civilizajn kon/diverĝojn, sur la paradigmata ebena de la alsimiliĝoj kaj forapartiĝoj esprimataj de elektanto per siaj elektemoj rilate la referencajn arojn. Kelkajn elementojn de tia kompreno oni ekkonstruas surbaze de la sperto de la multlingva lando Barato, reliefigante la rilaton inter la angla kaj la ekscesa industriigo de la scioj.

La scia bazo de la nuna interveno estas la substancismo, kia ĝi evoluis vizaĝe al la klerismo-malampleksiga formalismo en la lingvistiko. La dialoga bazo estas la evoluanta diskurso de la historiistoj ĉirkaŭ la subulisma rekonceptado de la civila socio kiel spaco de pluagado post la konstato, ke aporias la klasika klerismo kiel socipolitika kaj intelekta projekto. La nuna interveno proponas, ke ni allaboru al projekto de malfermita komunumo, kiu revastigas la ideon de la malfermita socio, sed aldonas la urĝecon de la akutaj bezonoj, kiuj estas parigendaj kun fortoj kapablaj liveri neprokrastemajn solvojn al la plej krizaj suferantoj. Tiucele oni lernas vastigi sian ĝentilecon aŭ civilecon. Se nia sento pri nia vizaĝo ekspansios multlingve, ni lernos afabli ankaŭ al tiuj apud ni sed ne tuje videblaj en nia vidkampo aŭ ne atingeblaj per precize tiu lingvo, kiun ni hazarde uzas. Voje al tio, necesos doni al la tradukado ŝlosilan niĉon en la ekologio de la projekto Malfermita Komunumo, kiu devas reformati nian metodaron doni altan profilon al la plej validaj scioj kaj iliaj kunrespondecioj, nun konceptotaj kiel transmodernaj. En ĉi tiu teksto mi proponas, ke la tradukistiko bezonas sin hardi ĉi-cele kaj uzi en sia refariĝo Esperanton.

Abstract: The key words *culture* and *civil* and *multilingual* and *substantivist* all fit this text's lock, civilization. In contrast to cultural postmodernism, the transmodern approach to civilization exemplified here stresses that learning is possible between parallel ways of knowing. Transmodernity tunes knowledge into experiences of experiences, in contrast to the postmodern tuning of power into actions on actions (which implies that knowledge always already centralizes and locks into power). Such tuning in begins to dismantle the formalistic abridgement of the Enlightenment. One analytical apparatus of this genre, the substantivist approach, theorizes about human choosing focusing on the cultural coefficients, which on that approach each chooser nurtures through every choosing, and on the civilizational con/divergences, on the paradigmatic axis of the assimilations and dissimilations expressed by a chooser through her choice tendencies relative to the reference sets. Some elements of such an understanding begin to emerge on the basis of experiences in the multilingual country India, especially the relation between English and overindustrialization of the cognitive.

The cognitive basis of the present intervention is substantivism as it has developed in linguistics in contrast to the abridged enlightenment perspective of formalism. The dialogical basis is the evolving discourse of historians surrounding the subalternist reconceptualization of civil society as a space for moving beyond the realization that classical enlightenment projects have reached a socio-political and intellectual aporia. I suggest that we work towards a project of an open community, which reexpands the idea of open society and adds to it the urgency of the most pressing needs, which are to be matched with agencies capable of providing nonprocrastinating solutions to those suffering most critically. To that end, one learns how to enlarge one's politeness or civility. If our sense of

our face expands multilingually, we will learn also how to be kind to those who share our spaces but are not immediately visible in our visual field or cannot be reached by just the language we happen to be using. On the way to this, it will be necessary to give translation a key niche in the ecology of the open community project, which has to reshape our notion of how to highlight the most viable knowledges and their concomitant responsibilities, now to be conceptualized as transmodern. In the present text I propose that translation studies needs to get its act together in this context and to use Esperanto in doing so.

Fu Kin-hung: *A Cross-Cultural Comparison Between First Naming in Cantonese and English (Interkultura komparo inter la uzado de individuaj nomoj en la kantona kaj angla lingvoj)*. Poster session.

Abstract: The first naming address between Chinese and English has a number of distinct variant forms. The English and Chinese both have one word, compound and nickname forms, but in contrast, the Chinese find more variant address forms. The reciprocal and nonreciprocal use of first name are conditioned by a number of factors such as sex, age, status, situation, etc. First naming is reciprocally used not only to address but also to define relationships between people. The first naming can also be used as a powerful and convenient device to achieve ends. The purpose of this paper is to make a cross-cultural comparison of the first naming between Chinese, Cantonese in particular, and English.

Koutny Ilona: *Esperanto kaj la angla kiel interkulturaj komunikiloj (Esperanto and English as intercultural communication)*.

Resumo: La prelego traktos interkulturan komunikadon kiam ne nur la kultura fono de la interkomunikantoj, sed ankaŭ iliaj gepatraj lingvoj estas malsamaj. Interkultura komunikado estos analizata en la kadro de i.a. ĝiaj celoj, manieroj, efikeco kaj eblaj konfliktoj. Gravan emfazon ricevos la influo de kulturo (kulturaj scioj, atendoj, valoroj, kutimoj, ktp.) de la interparolantoj sur la komunikadon kaj tiu ligita al la uzata komuna lingvo.

La internacia angla estos esplorata kiel lingvo kaj komunikilo inter kulturoj. Mi aplikos la samajn kriteriojn por esperanto kaj serĉos respondon al la demando, en kio ĝi diferencas de la angla en simila rolo kaj ĉu ĝi havas alian funkcion.

Abstract: The paper will treat intercultural communication in cases when not only the cultural backgrounds of the communicating partners but also their mother tongues are different. Intercultural communication will be analyzed in the framework of its goals, manners, effectiveness and possible conflicts. The influence of the culture (cultural knowledge, expectations, values, customs, etc.) of the interlocutors on the communication and that of the culture associated with the common language in use will be especially emphasized.

International English will be investigated as a language and communication tool between cultures. I will apply the same criteria for Esperanto, and try to answer the question of how it differs from English in the same role, and if it has another function.

Jouko Lindstedt: *Interlingva komunikado sen interlingvo: la balkania modelo (Cross-language communication without a lingua franca: the Balkan model).*

Resumo: En Balkanio la unua formiĝo de naci-ŝtatoj finiĝis nur komence de la 20-a jarcento. Ĝis tiam, ĉi tiu lingve bunta regiono apartenis al mult-etnaj imperioj – unue al la Bizanca, poste al la Otomana. Tie neniam ekzistis ĝenerale akceptata interlingvo, kaj ni ankaŭ ne havas atestojn pri iuj ajn piĝinoj vaste uzataj. Antaŭ la epoko de naci-ŝtatoj, la interlingva komunikado en Balkanio baziĝis sur stabila mult-lingvismo kun stabilaj prestiĝo-rilatoj inter la lingvoj – sociolingvistika situacio iom simila ekzemple al tiu en Barato. Rezulte de tio, la gramatikaj strukturoj de la lingvoj balkaniaj konverĝis, kvankam iliaj leksikoj restis apartaj. La mult-lingva situacio favoris la ekeston de tiaj gramatikaj trajtoj, kiuj estis facile identigeblaj inter la lingvoj.

Abstract: The primary formation of nation-states in the Balkans was not completed until the beginning of the 20th century. Before that, this linguistically diverse region was a part of two multi-ethnic empires—first the Byzantine, then the Ottoman Empire. There was never a generally accepted lingua franca, nor do we have evidence of any widely used pidgins. Before the era of nation-states, cross-language communication in the Balkans was based on stable multilingualism, with stable prestige relations among the languages—a sociolinguistic situation not unlike that in India, for instance. As a result, the grammatical structures of the Balkan languages converged, though their lexica remained distinct. The multilingual situation favoured the development of grammatical features that were easily identifiable across the languages.

Sven-Göran Malmgren: *From biskop to daytrader. Foreign influence on Swedish vocabulary as a result of cross-cultural communication (De biskop al daytrader. Fremda influo en la sveda vortprovizo rezulte de interkultura komunikado).*

Abstract: The paper gives a survey of 1000 years of lexical borrowing in Swedish, with emphasis on the last 200 years. It turns out that five languages dominate as loan-givers: Latin, Greek, French, German, and English. Since the end of the second world war, English is completely outstanding, but until the early 20th century English was still challenged by German and French. As for Latin and Greek loan-words, they have often come to Swedish via an intermediate language, e.g. French.

Resumo: La lekcio prezentos superrigardon de mil jaroj de leksika pruntado en la svedan, speciale dum la lastaj ducent jaroj. Montriĝas ke kvin lingvoj superregas kiel pruntedonantoj: la latina, greka, franca, germana kaj angla. Post la dua mondmilito la angla estas plene elstara, sed ĝis la frua dudeka jarcento ĝi estis kontestata de la germana kaj franca. Latinaj kaj grekaj pruntvortoj ofte alvenis al la sveda pere de alia lingvo, ekzemple la franca.

Franz-Georg Rössler: *La muziko – ĉu vere internacia lingvo? (Music – is it really an international language?)*

Resumo: La prelego montros, ke – rilate la komunikadon – la muziko estas ambigua. Unuflanke ĝi apartenas al la specifaj trajtoj de homgrupoj, per kiuj ili garantias sian identecon. Aliflanke ĝi fariĝas daŭre dum la historio ilo de interkultura komunikado. Dependis de la cirkonstancoj, ĉu tia dialogo okazis pace interkonsente, interŝange por ambaŭflanka riĉigo, aŭ trude, aplombe pro politika aŭ kultura premo.

Helpe de la modernaj rimedoj por rapida komunikado en la 20-a jarcento kreiĝis multaj muzikaj intermiksiĝoj. Per muziknotoj kaj sondiskaj ekzemploj la preleganto resumos tiun ĉi evoluon kaj dokumentos riĉigon kaj ankaŭ damaĝojn. Krome li provos respondi la demandon, ĉu la “mondmuziko” de la lastaj tri jardekoj vere kontribuis al la interhoma dialogo, ĉu ĝi fakte ekformis novan internacian lingvon. Kontraste li tralumigos la rolon de la muziko interne de la Esperanto-komunumo kaj ĝian eblan funkcion kiel ponto ekstermovaden.

Abstract: The lecture will show that—as far as communication is concerned—music is ambiguous. On the one hand, it belongs to the specific traits of human groups by which they guarantee their identity. On the other hand, it has become over and over again an instrument of crosscultural communication. It depended on the circumstances whether this dialogue occurred in a peaceful way, as an exchange for mutual enrichment, or as an intrusion due to political or cultural oppression.

With the help of modern methods for rapid communication, many musical mixtures were created in the twentieth century. Using musical notes and disks, the lecturer will summarize this evolution and document enrichment as well as damages. Moreover, he will try to answer the question whether the “world music” of the last thirty years really contributed to the interhuman dialogue, and whether it actually formed a new international language. By way of contrast, he will illustrate the role of music in the Esperanto movement and its possible function as a bridge to the world outside the movement.

Zlatko Tišljarić: *Ĉu interkulturaj diferencoj helpas aŭ malhelpas la interkulturan dialogon? (Are intercultural differences helpful for the process of intercultural dialogue?)*

Resumo: En eŭropa valor sistemo regas la konvinko, ke la diferencoj de Eŭropo estas gravaj pozitivaĵoj, kiuj helpas Eŭropon kreski. Oni konsideras la principon “ŝati la diferencojn” kiel gravan konsistan parton de eŭropa kompreno de la mondo. Diferencoj estas diversaj mozaikeroj el kiuj konsistas bela kaj harmonia bildo. Diversaj religioj, diversaj nacioj, diversaj lingvoj, diversaj politikoj, diversaj mondkonceptoj estas mozaikeroj, sen kiuj Eŭropo estus pala kaj uniforma, malinteresa kaj sen esencaj kvalitoj.

Sed ĉu la diferencoj per si mem kontribuas al harmoniigo de la komuneco? Ĉu sufiĉas nur havi tre diferencajn mozaikerojn por esti certa, ke oni kreas harmonian bildon?

Laŭ mi la diferencoj per si mem ne estas pozitivaĵo, ne estas io, kio garantias

harmonion de la tuto. Inverse, la baza karakterizo de diferencoj estas, ke tiuj mozaikeroj ne kongruas, ke oni ne povas kunmeti ilin kaj kunkalkuli. Du pomoj kaj du piroj restas du pomoj kaj du piroj. Oni ne povas diri ke ili estas kvar pomoj kaj piroj. Diversnaciaj homoj per si mem ne kongruas, ili malfidas unu al la alia. Same okazas pri diversreligiaj kaj diversrasaj homoj.

De kie do fontas la ideo pri harmonia bildo el tre diversaj mozaikeroj? De tio, ke eblas krei harmonian bildon, kondiĉe ke krom la diferencoj ekzistas io komuna al la mozaikeroj. La komuneco por iu harmonia bildo estas la ideo de la aŭtoro de la bildo. Li en sia vizio vidas la pozicion de la eroj en la bildo, li donas al ĉiu rolon en komuna celo: krei harmonian bildon, kiu havas novan komunan signifon kaj celon.

Se kunvenas diversnaciaj homoj, kiuj eĉ havas komunan lingvon (ekz. la anglan), sed ne havas iun ajn komunan celon, ideon, vizion – ili ne kreas harmonian movadon, socion. Kunagos kaj kunsocios nur ĉiu nacio por si mem, kvankam ili sidos apude dum la manĝoj.

Se kunvenas kune diversnaciaj esperantistoj, ili tuj kreas tuton, kiu funkcias kiel nova celkonscia “bildo”, ĝar ili havas komunan celon, ideojn, viziojn, al kiuj ili strebas. En tiu momento du pomoj kaj du piroj fariĝis kvar fruktoj.

Same okazas pri diversaj religioj aŭ iu ajn alia diverseco.

Sekve la diversecoj per si mem ne estas bonaj kaj ne garantias harmonion. Ili povas fariĝi elementoj de harmonia kaj mirinda tuto, nur se ilin unuigas iu komuna sameco (identeco).

Abstract: There is a conviction in the European system of values that differences in Europe are helpful and that they are helping Europe to grow. The slogan “cherish the differences” is the main principle of the European understanding of the world. Differences are building blocks for a beautiful and harmonious picture. Different religions, different nations, different languages, different political and ideological views are ingredients without which Europe would be pale, formal, and without essence.

But do differences themselves contribute to the making of a harmonious society? Is it enough simply to have diversity to be sure that they will create a harmonious picture?

For me differences are not enough. They do not guarantee a harmonious outcome. Another characteristic of those differences is that they are not compatible. They cannot be mixed together. Two apples and two pears are always just that. It is not possible to say that we have four apples or four pears. People of different nationalities are not compatible among each other because they are suspicious of one another. The same happens between people with different religious beliefs and people of different races.

So where does the idea about a harmonious picture made up from many different pieces come from? From someone who can create such a harmonious picture. But this is only possible if on top of all differences there is some connection between different pieces of the mosaic. The author of the mosaic comes up with the idea which makes this connection possible. The author knows the positions of all pieces of the mosaic. He decides about the role each element is about to play in the end and thus creates a harmonious image which has a new universal meaning

and purpose.

People of different nationalities who may even have the same language but do not have a common ideology or vision will not be able to form a harmonious society. Every nation acts as a separate unit although they may be seated together at a lunch table.

If esperantists of different nationalities meet they immediately form a whole that functions as a new conscious unit because they have a common ideology and vision towards they all strive. At that moment two apples and two pears become four fruits.

The same happens in case of different religions or any other differences. It is evident that differences are not automatically a good thing and they do not guarantee harmony. They are able to produce elements of harmony and wonderful whole only if they are able to unite some common identity.

Humphrey Tonkin: *Esperanto: La kultura dimensio (Esperanto: The Cultural Dimension)*.

Resumo: Zamenhof ne nur kreis planlingvon: li ankaŭ kreis plankulturon. La fruaj epokoj de Esperanto karakterizis klopodojn evoluigi komunajn valorojn por akompani la novan komunan lingvon. Mankoj en tiu komuneco kondukis al lingva skismo (la Ido-skismo), kiu tamen estis almenaŭ parte kultura skismo, kvankam oni ne klare rekonis tiun realon. La Esperanto-komunumo, kiel ĉiu alia komunumo, havas siajn mekanismojn por krei senton de kultura komuneco, sed ĝenerale la parolantoj de Esperanto ne donas sufiĉan atenton al kulturaj diferencoj – kiel montras ekzemple la preskaŭ kompleta manko de serioza studado de kultura malsameco ene de la Esperanto-komunumo. La ideologio de esperantismo emas supozigi, ke lingva harmonio egalas al socia kaj kultura harmonio. Manko de konscio pri kulturaj diferencoj nur fortigas ilian negativan efikon kiel obstakloj al la komunikado.

Abstract: Zamenhof not only created a planned language: he also created a planned culture. The early period of Esperanto was characterized by efforts to develop a set of common values to accompany the new common language. But the lack of such commonality of values led to a language schism (the Ido schism) that was in reality partly a cultural schism, although this reality was not clearly recognized at the time. The Esperanto community, like every other community, has its mechanisms for creating a sense of cultural commonality, but in general the speakers of Esperanto give insufficient attention to cultural differences—as is evident in the almost total lack of serious study of cultural differences within the Esperanto community. Esperantist ideology tends to give the impression that linguistic harmony equals social and cultural harmony. A lack of awareness of cultural differences only increases their negative effect as obstacles to communication.

Partoprenintoj

Participants

1. Herman Alexander. Kamniske probe 11, SI-2035, Kamnice, Slovenio.
2. Sture Allén, Professor of Computational Linguistics 1972–1993 at Göteborg University; Member of the Swedish Academy; its Permanent Secretary 1986–1999. Håkansdal 86, SE-417 49 Göteborg. Honorary Chair of the Program Committee. Speaker.
3. Lars-Gunnar Andersson (lars-gunnar.andersson@svenska.gu.se). Professor of Modern Swedish. Göteborg University, Department of Swedish. P. O. Box 200, SE-405 30 Göteborg, Sweden. Speaker.
4. Anita Bergh (anita.bergh@swipnet.se).
5. Detlev Blanke (dblank.gil@snafu.de). Dr. habil., Universitato Humboldt, Berlino. Prezidanto de Gesellschaft für Interlingvistik e.V. Adreso: Otto-Nagel-Strasse 110, DE-12683 Berlin, Germanio. Lekciis.
6. Wera Blanke (wera.blanke@snafu.de). Otto-Nagel-Strasse 110, DE-12683 Berlin, Germanio.
7. Renato Corsetti (renato.corsetti@uniroma1.it). Profesoro pri psikopedagogio de lingvoj kaj komunikado; ĝenerala sekretario de la Akademio de Esperanto. Universitato de Romo “La Sapienza”, Facoltà di Psicologia, Via del Marsi 78, IT-00185 Roma, Italio. Membro de la programkomitato. Lekciis.
8. Probal Dasgupta (probal_dasgupta@hotmail.com), (probal53@yahoo.com). Profesoro pri aplika lingvistiko; dekanano de la Humanisma skolo; vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto. Universitato de Hyderabad, Centro por aplika lingvistiko kaj tradukscienco, IN-500 046 Hyderabad, Barato. Membro de la programkomitato. Lekciis.
9. Marcel Delforge, Belgio.
10. Wim M. A. De Smet, doktoro. Hertendreef 12, BE-2920 Kalmthout, Belgio.
11. Johan Derks (derks.esp@tiscali.nl). Rietgors 40, 8271 GH IJsselmuiden, Nederlando. Sociologo kaj docento pri matematiko (speciale interesita pri ĝia historio).
12. Agneta Emanuelsson (agi.emmanuelsson@telia.com). Svedio.
13. Ulrich Farrenkopf (ulrich_farrenkopf@yahoo.com). Nibelungenstrasse 54, DE-63897 Miltenberg, Germanio. Esperantisto. Intereso: romanistiko, pedagogio.
14. FU Kin-hung (khfu@ied.edu.hk). Chinese Department, The Hong Kong Institute of Education, 10 Lo Ping Road, Taipo, N.T. Hong Kong. Presented a poster.
15. Gunnar Gällmo (gunnargallmo@yahoo.se). Tensta Allé 12, SE-163 64 Spånga, Svedio. Literatura tradukisto kaj verkisto; literary translator and writer.
16. Tuomo Grundström, (tuomo.grundstrom@lailanet.fi). Rauma, Finnlando. Pedago, logopediisto.

17. Jarl Hammarberg <jarlo@swipnet.se>.
18. HOANG Minh Phung (Feniksa), Vjetnamio.
19. Christer Kiselman <kiselman@math.uu.se>. Profesoro pri matematiko; vicprezidanto de la Akademio de Esperanto; membro de la Reĝa Sveda Akademio de Sciencoj. Adreso: Upsala Universitato, Matematika instituto, Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio. Prezidanto de la programkomitato.
20. KOUTNY Ilona <ikoutny@amu.edu.pl>. Dr-o.; membro de la Akademio de Esperanto. Adam-Mickiewicz-Universitato, Instituto de lingvistiko, Międzychodzka 5, PL-60-371 Poznan, Pollando. Lekciis.
21. Matti Lahtinen <ultmar@suomi24.fi>. Kettutie 5 A, FI-00800 Helsinki, Finnlando.
22. Jens Stengaard LARSEN <jens@cphling.dk>. Adreso: c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77, DK-2770 Kastrup. Kvardekdujara studento de lingvistiko, eksa bibliotekisto kaj komputilisto, esperantisto deposed 1973.
23. Chongsae Lee <chongsae@kist.re.kr>. Ma-1104, Samho Apt., Bangbae-dong, Seocho-gu, Seoul, Koreio. Advisor and English language instructor, Korea Institute of Science and Technology. Komitatano A el Korea Respubliko.
24. Sian Leitch. Dr. Ing. <sleitch@nildram.co.uk>. Retired software engineer. Interested in the history and origin of the Phoenicians.
25. Jouko Lindstedt <jouko.lindstedt@helsinki.fi>. Profesoro pri slava filologio; membro de la Akademio de Esperanto. Universitato de Helsinko, Instituto de slavistiko kaj baltologio, Poŝtkesto 24, FI-00014 Universitato de Helsinko, Finnlando. Lekciis.
26. Christer Lörnemark <loerne@ling.gu.se>, <loerne@gmx.net>. Institutionen för lingvistik, Göteborgs universitet, Box 200, SE-405 30 Göteborg. Telefonj: +46-31-41 26 53 (h), +46-31-773 44 79 (l).
27. Osman LUCERO ANZURES <otm60@hotmail.com>. Adreso: Oriente 253 y Sur 20, Secc. F1, casa 81; Col. Agricola Oriental; MX-08500 Mexico DF; Meksikio. Lic.; grafikisto de la Centro pri Instruado de Fremdaj Lingvoj ĉe UNAM (Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksikio).
28. Sven-Göran Malmgren <sven-goeran.malmgren@svenska.gu.se>. Professor of Swedish. Göteborg University, Department of Swedish. P. O. Box 200, SE-405 30 Göteborg, Sweden. Member of the Program Committee. Speaker.
29. Ana Montesinos <anamontesinos.esper@btinternet.com>. Adreso: 82 Waterford Road, UK-SW6 2DR London, Britio.
30. John Murray <john.murray@esperanto.ie>. Adreso: 23 Knockgreenan Avenue, Omagh, BT79 0EB, Nord-Irlando.
31. Johano Negrete <jnegrete@reacciun.ve>. Apartado 41301, Chaguaramos, Caracas 1041-A, Venezuelo. Emerita profesoro pri filozofio, logiko kaj epistemologio en la Universidad Central de Venezuelo.
32. Bertil Nilsson <stni8588@student.su.se>.

33. Atilio ORELLANA ROJAS <iei001@tiscali.nl>. Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Licenciulo pri latina kaj greka filologio. Direktoro de Internacia Esperanto-Instituto.
34. Gilles Patrin. 12, rue Bouchet, FR-75015 Paris. Pensiisto, antaŭe laboristo. Intereso: sciencoj, lingvoj, lingvistiko, historio.
35. Magnus Persson <magnus.persson.uppsala@user.bip.net>. Tunagatan 3 C, SE-753 37 Uppsala.
36. Margreet Peschier <map.peschier@wolmail.nl>. Joke Smitplein 20, NL-3581 PZ Utrecht. Interesiĝo pri inter-/transkultura komunikado.
37. Åke Rohdin <ake.rohdin@telia.com>. Västbjörka Forsgatu 4, SE-795 95 Vikarbyn, Svedio. Telefono +46-248-204 21. Eksa sekcia direktoro ĉe la Nacia statistika oficejo. Formerly Principal Administrative Officer at Statistics Sweden. Plej gravaj intereso: lingvistiko, geneologio, fotografado.
38. Franz-Georg Rössler <rozsas@web.de>. Am Mönchsbusch 6, DE-67373 Dudenhofen, Germanio. Lekciis.
39. Rita Rössler-Buckel. Am Mönchsbusch 6, DE-67373 Dudenhofen, Germanio.
40. Elisabeth Schwarzer <werkstethno@arcor.de>. Kaiserin Augusta-Strasse 75, DE-12103 Berlin. Etnologino.
41. Victor Sirvent <vsirvent@usb.ve>. Departamento de Matematicas, Universidad Simón Bolívar, Apartado 89000, Caracas 1086-A, Venezuela.
42. Marianne Ståhlberg <marianestahlberg@yahoo.com>. Baggbölevägen 9 A 3, FI-00630 Helsinki, Finnlando.
43. Zlatko Tišljar <zlatko.tisljar@azm-lu.si>. Besednjakova 1 SI-2000 Maribor, Slovenio. Tel. +386-2-2341124. Lekciis.
44. Humphrey Tonkin <tonkin@mail.hartford.edu>. Profesoro pri humanistiko; emerita rektoro; membro de la Akademio de Esperanto. Universitato de Hartford, West Hartford, CT 06117, USA. Lekciis.
45. José Antonio VERGARA <jovergaola@surnet.cl>. Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio.
46. Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, SE-412 71 Göteborg, Svedio.
47. Kaarlo Voionmaa <karolus@brevet.nu>. Norra Krokslättsgatan 6, SE-412 64 Göteborg.
48. Amri Wandel <amri@vms.huji.ac.il>. Profesoro pri astrofiziko; membro de la Akademio de Esperanto. Racah Institute of Physics, The Hebrew University of Jerusalem, Israel.
49. Bertilo Wennergren <bertilow@gmx.net>. Membro de la Akademio de Esperanto, Direktoro de ties Sekcio pri la ĝenerala vortaro. Quenstedtstrasse 32, DE-72076 Tübingen, Germanio.